

Kooperaj bankoj en Saskĉevano

Bruce Arthur

Kebekianoj sendube scias, ke la kooperaj bankoj estas gravaj en Kebekio. Ja, la unua koopera banko en Norda Ameriko fondiĝis en Kebekio (fare de Alphonse Desjardins, en 1900). Sed Kebekianoj eble ne scias, ke kooperaj bankoj estas gravaj ankaŭ en la provinco Saskĉevano, kie mi loĝas. Fakte, pli ol duono el la loĝantoj de Saskĉevano estas membroj de koopera banko. Kebekianoj eble interesiĝus legi informojn pri kooperaj bankoj en Saskĉevano, kaj kompari tion al Kebekio.

Dum la 1930^{aj} jaroj, en Saskĉevano oni pristudis la kooperajn bankojn, kiuj jam ekzistis en Kebekio kaj Nova Skotio. En 1937 la provinca parlamento kreis leĝon, kiu ebligis la fondon de kooperaj bankoj. Laŭ tiu leĝo (malsame ol la nuntempa leĝo), la membroj de koopera banko devis havi komunan trajton. Ekzemple, ĉiuj eble estis anoj de la sama religio aŭ de la sama profesio. Sed ĉi tiu komuna trajto povis esti nur la fakto, ke ĉiuj loĝis en la sama distrikto aŭ kvartalo. Ĉi tiaj kooperaj bankoj estis (kaj estas) multe pli nombraj en la provinco

ol tiaj por ununura religio aŭ profesio aŭ simile.

La unua koopera banko ekster urbo fondiĝis en la vilaĝo Lefleche. Ĉi tiu estis sukcesa kaj centoj da aliaj vilaĝoj faris same.

Kooperaj bankoj estas demokratiaj asocioj. Ties membroj elektas el inter si estraron. Se koopera banko gajnas profiton, ĝi povas doni ĝin al siaj membroj proporcie al kiom ili uzis la kooperan bankon. Sed koopera banko povas fari tion nur se ĝia rezervo estas sufiĉe granda.

Nur unu jaron post la fondiĝo de la unuaj kooperaj bankoj, ili kreis la Saskĉevanan Ligon de Kooperaj Bankoj por reprezenti sin kaj provizi iujn servojn. En 1941 ili kreis la Saskĉevanan Kooperan Kreditan Societon, kiu servas kiel banko por kooperaj bankoj. En 1990 ĉi tiuj du asocioj kuniĝis — la nova asocio nun nomas sin Saskĉevana Centro de Kooperaj Bankoj. La kooperaj bankoj de Saskĉevano elektas la estraron de ĉi tiu Centro.

Ankaŭ aliaj provincoj havas Centrojn de Kooperaj Bankoj,

kaj la Centroj de ĉiuj provincoj (escepte Kebekion) kune posedas la Kanadan Centron de Kooperaj Bankoj.

Alia asocio estas la Depon-Garantia Kompanio de Saskĉevanaj Kooperaj Bankoj. Ĝi fondiĝis en 1951 por sekurigi la depon-kontojn de la membroj de kooperaj bankoj. Ĉiuj kooperaj bankoj devas pagi kotizojn al ĝi. En 1970 ĝi atingis sian celon havi posedaĵojn egalajn al unu el cent de ĉiuj posedaĵoj de kooperaj bankoj. Ĝi reatingis ĉi tiun celon en la 1980^{aj} jaroj. En 2002 ĝi fartis sufiĉe bone ke ĝi povis malpliigi siajn kotizojn.

Ĉi tiu asekura kompanio senlime garantias la deponojn en kooperaj bankoj kiuj bankrotiĝas. Sed ĝi laboras plej parte por preventi problemojn en kooperaj bankoj. La estraro de la garantia kompanio estas elektata fare de la Centro de Kooperaj Bankoj kaj fare de la provinca registaro.

La fruaj kooperaj bankoj estis simplaj kaj malgrandaj, sed ili pligrandiĝis kaj komencis oferti pli da servoj.

(Sekvo en la dua paĝo...)

Kooperaj bankoj en Saskĉevano (sekvo)

Bruce Arthur

En la fruaj 1960^{aj} jaroj, plimultaj havis salajratan kasiston aŭ direktoron, kaj multaj havis novajn konstruaĵojn kaj ofertis ĉekajn kontojn (antaŭe nur ŝparkontojn kaj akciojn). Hodiaŭ kooperaj bankoj ofertas preskaŭ ĉian finanĉan servon.

En 1965 la nombro de kooperaj bankoj en Saskaĉevano atingis la plejgrandan nivelon. Post tio, kuniĝoj malpliigis la nombron de kooperaj bankoj. En 2002, estis 128 kooperaj bankoj. Malmultaj

urbetoj aŭ vilaĝoj ankoraŭ havas sendependan kooperan bankon — anstataŭe, ili havas filion de pli granda koopera banko. Oni eble festas aŭ bedaŭras ĉi tiun ŝanĝon.

Jen interesaj ciferoj: en 1947, meznombra koopera banko en Saskaĉevano havis 164 membrojn kaj posedaĵojn de proksimume 27 000 dolaroj. En 2002, meznombra koopera banko havis 4 450 membrojn kaj 64 milionojn de dolaroj.

Kaj certe teknologio ŝanĝiĝis. La unuaj kooperaj bankoj tute ne havis komputilojn. Sed ĉi-jare mi legis la finanĉan raporton de mia koopera banko, kaj mi interesiĝis vidi tie, ka la komputiloj de la koopera banko havis koston (aĉet-prezon) de pli ol miliono da dolaroj! Temas pri pli ol po 200 dolaroj por membro.

Jen informoj pri la kooperaj bankoj en Saskaĉevano. Ĉu la kooperaj bankoj de Kebekio similas aŭ malsimilas?

Novaj servoj ĉe retejo de ESK

Boris-Antoine Legault

Retejo de Esperanto-Societo Kebekia estis renovigita ! Eblas nun pagi membran kotizon kaj fari donacojn rete, pere de kreditkarto aŭ PayPal-konto (<http://esperanto.qc.ca/eol/paiement>), plifacilas trafoliumi la diversajn sekciojn, kaj estis ankaŭ aldonita sekcio pri novaĵoj. Notu ke retportalo pri Esperanto en Kanado estis ankaŭ antaŭnelonge renovigita. Ĉe <http://esperanto.ca> nun eblas partopreni diskutojn kaj havi propran blogon en Esperanto.



**Société québécoise d'espéranto
Esperanto-Societo Kebekia**

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Rédaction : Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Normand Fleury (président), Martin Benoit (vice-président), Boris-Antoine Legault (secrétaire), Sylvain Auclair (trésorier) et Yan Levasseur (conseiller) .

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d. Redaktado: Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Normand Fleury (prezidanto), Martin Benoit (vicprezidanto), Boris-Antoine Legault (secrétaire), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Yan Levasseur (konsilanto).

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2007.09.01

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 • informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

Kia movado por Montrealo

Sylvain Auclair

L'auteur discute les conséquences de l'inexistence d'un club d'espéranto pour Montréal et son remplacement par la SQE.

En la komenco estis la Montreala Esperanto-Klubo. Ĝi fondiĝis antaŭ multaj jardekoj, kaj la tiamaj Montrealaj Esperantistoj eĉ iniciatis Lumon, la revuon de la Kanada Esperanto-Asocio. Antaŭ preskaŭ trideko da jaroj fondiĝis ESK, interalie ĉar pluraj Kebekiaj Esperantistoj ne estis kontenta pri la agado de KEA kaj preferis ekster tiu peza strukturo.

Kvankam en la unuaj estraroj de ESK membris ano el Kebekio kaj ano en Ŝerbruko, kie ekzistis kluboj, kiuj de tiam malaperis, la sidejo kaj plej multaj aktivuloj de ESK estis en Montrealo. Malgraŭ siaj provoj, ESK iĝis Montreala.

Dume plu ekzistis la Montreala Esperanto-Klubo, kiu okazigis diversajn renkontiĝojn en diversaj lokoj. MEK havis apartan estraron kaj apartan bankokonton, sed kompreneble pluraj el ties aktivuloj estis ankaŭ aktivuloj de ESK. Kaj fine montriĝis pli simple okazigi la renkontiĝojn de MEK en la Montreala Esperanto-Domo, kiu estas la sidejo de ESK. Kaj montriĝis pli simple konfidi la monon de MEK al ESK. Kaj...

Kaj MEK malaperis. Ĝi fandiĝis en ESKon. La Montrealajn renkontiĝojn nun aranĝas la estraro de ESK. Kvankam ESK estas laŭcele tutkebekia, ĝi tamen

ne povas, pro manko de mono kaj de homfortoj, okazigi regulajn aranĝojn en aliaj urboj de Kebekio, eĉ se tie troviĝas kerno da Esperantistoj. La lastas MEKARon en Montrealo organizis ESK, nome de la Montrealaj Esperantistoj, sed oni devis malsekvi la originalan ideon de MEKARo, kiu antaŭvidis aranĝojn ankaŭ en Kebeko, pro manko de Kebekaj agemuloj

Ĝenerala kunsido okazos en Septembro

Cetere, malaperis ankaŭ la Kekeba Esperanto-Klubo, la Esperanto-Klubo de Okcidenta Montrealo kaj la Ŝerbruka Esperanto-Societo. Antaŭ jardekoj eĉ en Tririvero estis agema klubo.

Tamen, dum la lasta jaro, laŭ iniciato de Boris Legault, estrarano de ESK, fondiĝis kluboj en la Montrealaj universitatoj (universitataj kluboj ofte ĝuas diversajn avantaĝojn: buĝeton, senpagan aŭ malmultekostan ĉambron, rajton anonci en la universitato, k.s.), kiuj ligiĝis en iu Montreala Esperanto-Movado. Laŭ ties ĉefa aganto, ĝi ne estas organizo, havante nek estraron, nek monon, nek registaran agnoskon. Ĝi tamen havas ttt-paĝon kaj retan bultenon.

Mi trovas strange, ke estas, unuflanke, tutKebekia societo, kies eble plej grava agado estas okazigo de klubecaj vesperoj en nur unu urbo; kaj, aliflanke, « movado » kiu agadas nur en universitatoj. Laŭ mi, devus esti apartaj Montreala kaj Kebekia organizoj. Kun diversaj agantoj, apartaj teamoj. Sed ĉu ekzistas sufiĉe multaj interesitoj? Ĉiuj provoj dediĉi unu homon al la okazigo de la Montrealaj vesperoj, kadre de ESK, ĝis nun fiaskis.

Aŭ eble, eble... ESK devus plu efike zorgi pri okazigo de aranĝoj en aliaj urboj. Sed la homfortoj mankas... Kaj mi forte dubas, ke Esperantistoj en Kebeko aŭ en Ĉikutimo konsentus agadi kadre de tutKebekia organizo. Kial do en Montrealo?

Povus estis la mala solvo: kial la Montreala Esperanto-Movado fariĝus pli ol ttt-paĝo kun pompa nomo kaj plenumus sian nomon, fariĝante la vera organizanto de Esperanto en Montrealo, ne nur en universitatoj? Kial ne?

Ĝenerala kunsido okazos en Septembro...

Nouvelles options sur le site web de la SQE

Boris-Antoine Legault

Le site web de la Société québécoise d'espéranto a été rénové ! Il est maintenant possible de payer sa cotisation de membre et de faire des dons en ligne, au moyen d'une carte de crédit ou d'un compte PayPal (<http://esperanto.qc.ca/fr/paiement>). Il est également plus facile de se déplacer sur le site, et une section sur les nouveautés a été ajoutée. Notez également que le portail pour l'espéranto au Canada a également été reconstruit récemment. Il est maintenant possible de participer à des discussions et d'avoir son propre blogue en espéranto sur le site <http://esperanto.ca>

De quelques prépositions¹

Sylvain Auclair

Vous vous souvenez, j'ai demandé dans cette rubrique des idées de sujets à traiter. On m'a demandé de présenter la différence entre *el* et *de*. Ça m'apprendra!

C'est que, voyez-vous, il s'agit d'un cas très, mais voilà très compliqué. D'un cas où Zamenhof aurait dû y penser à deux fois avant de nous définir les prépositions à partir de quelques traductions. En conséquence, la définition de *de*, dans le *Plena Ilustrita Vortaro*, occupe plus de deux colonnes. Et une chance que je n'ai pas sous la main un exemplaire de la *Plena Analiza Gramatiko*! (Je lui préfère de toute manière la *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, accessible sur Internet; elle est beaucoup moins chargée de toute la tradition grammaticale occidentale.)

Donc, *el* et *de*. À la base, les deux peuvent présenter le lieu d'où l'on vient. Cependant, *el* se rapporte davantage au lieu **de l'intérieur duquel** on vient, alors que *de* est un peu moins précis à ce niveau et

s'intéresse davantage à **l'origine** au sens plus large. Par exemple, je puis dire *Mi estas de Montrealo* pour présenter mon lieu de naissance ou celui de ma résidence habituelle, alors que, s'il s'agit d'un voyage, on aurait plus tendance à dire *Mi veturis el Montrealo* (même si *de Montrealo* ne serait pas franchement mauvais non plus). Comme vous voyez, c'est assez confus.

Par ailleurs, *el* et *de* ont beaucoup d'autres usages. *El* peut montrer l'état antérieur ou la substance de départ: *memblo farita el ligno*; l'origine au sens figuré: *rakonto el la Biblio, ami el sia tuta koro*; ou le groupe duquel on tire un élément: *unu el ili, la plej juna el la familio*, etc.

Quand à *de*, attachez vos tuques! (Je sais, c'est l'été...) En plus de l'origine, disons, spatiale, *de* peut montrer l'origine temporelle ou la durée écoulée (comme le français *depuis*), mais, pour la clarté, on utilise aussi les composés de *post*, de *antaŭ* ou *ekde*, dont le sens n'est

pas tout à fait le même (*de post* signifiant *depuis la fin de*; *ekde*: depuis le début de; quant à *de antaŭ*, il a lui-même plusieurs sens, selon celui attribué à *antaŭ*, qui peut vouloir dire *il y a* ou *avant*...)

Par ailleurs, *de* peut aussi introduire l'origine au sens figuré: *tremi de febro*, mais aussi le propriétaire: *la libro de Ludoviko*; l'agent, c'est-à-dire celui qui fait l'action, que ce soit dans une phrase passive: *domo konstruita de laboristoj*, ou bien *tero kovrita de neĝo*, ou dans une structure de phrase sans verbe: *traduko de Zamenhof* (mais, pour la clarté, on utilise parfois *fare de*, voire la préposition non officielle *far*, qui va cependant à l'encore du *Fundamento*, qui affirme clairement que l'agent d'un verbe passif est introduit par *de*).

Malgré cette multitude de fonctions ou de sens pour la préposition *de*, il est toutefois déconseillé de prononcer ou

(suite à la page 5)

MEKARO 2007

Ken Price

La Montrealaj esperantistoj meritas dankon pro la bone organizita turisma renkontiĝo dum la longa semajnfino 19-21 majo. Kvin el niaj membroj veturis al Montrealo, kaj partoprenis la 5^{an} Mez-Kanadan Esperantistan Renkontiĝon.

La programo komenciĝis sabate matene, kiam ni renkontiĝis en la malnova kvartalo, kaj dividiĝis en kvin aŭ ses pli malgrandajn grupojn, ĉiu kun loka gvidanto. En tiu kvartalo estas kelkaj el la plej frue konstruitaj turoj de la malnovaj bankoj. Dum la epoko kiam ili konstruiĝis, oni konstruis bele ornamitajn fasadojn, ne la « skatolojn » kiuj estas la nuntempa stilo.

Inter la vizititaj lokoj estis la Domo Sir Wilfrid Laurier, kaj la Kastelo Ramesay. Tiu agrabla sunplena tago finiĝis per komuna manĝado en restoracio en la proksima ĉina kvartalo.

Dimanĉo 10 h, vizito al la Muzeo de malnova Montrealo, kaj poste lunĉo en itala restoracio.

Post lunĉo ni iris al UQÀM (Universitato de Kebekio ĉe Montrealo) por prelegetoj. Ĉiuj estis interesaj, sed mi aparte mencias nur ĉi tiujn. Behrouz, iama Montrealano, kiu nun estas Torontano, informis nin pri persa (irana) historio helpate de komputile projekciitaj diagramoj kaj bildoj.

Ne nur jam spertaj esperantistoj prelegis. 16-jara Benjameno el

Otavo, kiu eklernis Esperanton en julio pasintjare, faris mirinde kompetentan prelegeton, ankaŭ ilustritan per projekciitaj bildoj. Magnolia, kiu lernis en la klaso de Boriso en la universitato dum la pasinta vintro, jam kapablis paroli pri la kongruaj celoj de Esperanto kaj Bahaaismo.

Je 18 h ni promenis al tre bona vegetara bufeda restoracio Commensal. Mi notis ke la prezoj ŝajnas esti iom malpli altaj ol en la toronta Commensal. Post bonega dumtaga vetero, pluvetis iomete kiam ni piediris de la restoracio al konstruaĵo de la (Kanada) Nacia Film Instanco, kiu bonŝance estis proksima.

Lunde je la 10 h - la pluvo jam ĉesis, kaj la suno brilas denove - Rendezuo ĉe Kastora Lago sur la Reĝa Monto - agrabla promonado sur vojo tra arbaro - vizito al Smith Domo. Smith dezajnis kelkajn el la plej famaj parkoj en norda Ameriko, inkluzive ĉi tiun sur la Reĝa Monto en Montrealo. Post tempo por rigardi la ekspozicion tie, ni piediris al belega piknikloko ĉe Kastora Lago. Denove multan dankon al la Montrealanoj, kiu multe laboris por fari, kaj alporti, abundajn bonegajn manĝaĵojn.

Tre sukcesa Mekaro finiĝis oficiale je 14 h, post invito de Skoto renkontiĝi venontjare en Toronto dum la Viktoria-taga semajnfino por la 6^a Mekaro.

De quelques prépositions¹ (sekvo)

Sylvain Auclair

d'écrire une phrase telle que la suivante: *Mi legas la tradukon de Hamleto de Shakespeare de Zamenhof de la kluba biblioteko de tri horoj...*

Pour plus d'exemples, allez jeter un coup d'œil au *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*: <http://bertilow.com/pmeg/gramatiko/rolmontriloj/rolvortetoj/de/index.html> et http://bertilow.com/pmeg/gramatiko/rolmontriloj/rolvortetoj/direktaj_rolvortetoj/el.html

Kun et per

Ici, c'est plus simple. Même si les deux sont traduits en français par *avec*, leurs sens sont plus clairement distincts. *Per* sert à identifier l'outil, alors que *kun* présente l'accompagnateur: *Vojaĝi per aŭto kun la familio. Vojaĝi al Eŭropo kun sia biciklo kaj en Eŭropo per ĝi.*

1 Le titre illustre un usage inhabituel et ancien de de, calqué sur un usage latin, avec le sens de à propos de. On voit beaucoup d'ouvrages anciens dont le titre commence avec un tel de.

Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

DATO	KIE	HORO	TEMO
ven. 28 ^a sep. 2007	MEDO **	19 h	Ĝenerala kunveno
5-8 ^a okt. 2007	Silvero (Usono)		ARE. Detaloj : vidu ĉe www.esperanto.qc.ca
ven. 26 ^a okt. 2007	MEDO **	19 h	Festoj
ven. 30 ^a nov. 2007	MEDO **	19 h	Teo
sab. 15 ^a dec. 2007	Ejo elektota	18 h	Decembra Festo kaj komuna bufedo
12-18 jul. 2008	Montrealo		Tut-Amerika Kongreso de Esperanto

** **Montreala Esperanto-Domo (MEDO):** 6358-A rue de Bordeaux, Montréal

Entre Papineau et De Lorimier.

Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est

Voir le site web pour un plan d'accès : www.esperanto.qc.ca

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*

Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, libro - pruntado kaj - aĉetado, aliĝo al ESK.*

Annonces, emprunt ou achat de livres, de revues, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*

Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

Por komentoj, proponoj, demandoj : informo@esperanto.qc.ca

Kaj?

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto et un regroupement de club espérantistes. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego@esperanto.qc.ca...

Club d'espéranto de l'UdeM: udem@esperanto.qc.ca Club d'espéranto de l'UQAM: uqam@esperanto.qc.ca

M^cGill Esperanto Club: mcgill@esperanto.qc.ca

MEMO, Montreala Esperanto-Movado : www.esperanto-montreal.org



MEKARO 2007 : grupo de partoprenantoj